**Praha-ek-1956-39_40-10**



TKKE INFORMAS

N-ro 6. Julio-Aŭgusto 1956 Aperas laŭbezone.

M I N I S T E R S T V O   K U L T U R Y

Číslo: sine. Praha, dne 15. června 1956

Ministersvo kultury, správa pro věci osvěty, potvrzuje, že Celostátní esperantský sbor, reprezentovaný soudruhem Josefem Vítkem jako předsedou, je oprávněn na základě jednání o úpravě poměrů v esperantském hnutí provádět veškeré přípravné práce potřebné k řešení tohoto problému.

vedoucí správy pro věci osvěty:
Ant. Richter, v. r.

Ministerio de kulturo, administrejo por popolklerigo konfirmas, ke la Tutŝtata Konsulta Komitato Esperantista, reprezentanta de k-do Josef Vítek kiel prezidanto, estas rajtigita baze de la traktadoj pri normaligo de esp. movado fari ĉiujn preparlaborojn por solvi la problemon.

gvidanto de la administrejo por popolklerigo
Ant. Richter, p. m.

- - -

O f i c i a l a   s c i i g o   d e   l a   p r e p a r k o m i t a t o   d e   Ĉ e ĥ o s l o v a k a   E s p e r a n t o –
-A s o c i o   /TKKE/:

T U T Ŝ T A T A   K O N F E R E N C O
DE ĈEĤOSLOVAKAJ ESPERANTISTOJ

Okazos la 20-an kaj 21-an de oktobro 1956 en Olomouc en salonego de Julius Fučík /est. Reduta/. Temo: Fondo de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Asocio. Antaŭ la konferenco sabatvespere Arta vespero. Partoprenos oficialaj reprezentantoj kaj eksterlandaj delegitoj. Por faciigi la plej grandan partoprenon de ĉs. esperantistko estos fervojrabato. Jam nun estas necese provizore anonci sian partopreon al s-ano J. Karhan, Na hradě 2, Olomouc. La preparkomitato tiel havos supervidon pri tranokto, manĝoservo kaj fervojrabato. En septembro estos anoncita preciza programo, kiun fiksos la komitatanoj de TKKE dum sia kunveno en Doksy.

- - -

Preparkomitato de ĈEA /TKKE/ kunvokas por dimanĉo la 22-an de julio ĉiujn komitatanojn en Doksy por pridiskuti aktualajn problemojn de ĉs. esperantismo. Komenco je la 9-a horo en la lernejo de Somera Esperanto-Kolegio. Antaŭvespere en la sama ejo je la 20-a horo preparkunsido de la jam alvenintaj komitatanoj. Anoj de la komitato de TKKE konsideru via devo partopreni la gravan preparkonferencon, ĉar komuna estas nia respondeco!

| | | |
|---|---|---|
| Josef Kožený, gvidanto de organiza sekcio | Josef Vítek, prezidanto | Milan Rudolf, sekretario |